Kuba vicprezidento vizitas Sudafrikon

Image not found or type unknown



Salvador Valdés en Sudafriko

Pretorio, jun 18 (RHK) La vicprezidento de Kubo, Salvador Valdés Mesa, honoris hodia? en la Freedom Park, en ?i tiu ?efurbo, la memoron de la internaciistaj batalantoj de la kariba insulo, kiuj falis en la luktoj por la sendependeco de afrikaj nacioj.

Anta? la tiel nomata Muro de Nomoj, Valdez Mesa metis florkronon kie estas gravuritaj en ?tonon la nomoj de pli ol du mil kubanoj, kiuj mortis por la libereco de afrikaj popoloj.

En sia vizito al Sud-Afriko, la vicprezidenton akompanas delegacio formita de Tania Margarita Cruz Hernández, unua vicministro pri Publika Sano; Anayansi Rodríguez Camejo, vicministro pri eksteraj aferoj; kaj Luis Amorós Núñez, direktoro de Subsahara Afriko ?e la Kuba Ekstera Ministerio.

Post lia alveno al Freedom Park, Valdés Mesa estis akceptita fare de la portempa Ministro de Sporto, Arto kaj Kulturo, Maropene Ramokgopa, kaj la portempa Vicministro de Sporto, Arto kaj Kulturo, Pinky Kekana, same kiel de la prezidanto de la Konsilio de tiu memorinstala?o, ambasadoro Bheki Langa.

Dum dialogo, la de?oranta vicministro emfazis, ke, en la nuna sudafrika kunteksto, markita de la starigo de Registaro de Nacia Unueco, la popolo de Kubo "da?re estas niaj amikoj".
La eblecoj de kunlaboro inter amba? nacioj, emfazis Kekana, restas promesplenaj.

Dum la dialogo, Valdés Mesa rememorigis la proksimajn ligojn de amikeco kaj kunlaboro inter la du nacioj kaj proponis ?eneralan superrigardon de aktuala?oj en Kubo.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/357737-kuba-vicprezidento-vizitas-sudafrikon

Radio Habana Cuba